Konkurso!

360 premioj en la sumo de 50,000 markoj,

kaj, krom tio, domo en Parkurbo, valoranta

18,000 markojn, aŭ **15,000** markojn per mono al tiuj, kiuj varbos

la plej grandan nombron da aĉetantoj de la lotleteroj.

Por rekompenci tiujn el niaj gesamideanoj, kiuj ekvolos laŭforte helpi al nia tre grava, serioza kaj malfacila entrepreno, kaj kune por plirapidigi la disvendadon de la lotleteroj de nia Internacia Loterio, ni decidis doni **en ĉiu serio po 36 premioj** al tiuj, kiuj varbos por ni la plej grandan nombron da aĉetantoj, laŭ jena kalkulo: unu premio — 1000, unu — 600, unu — 500, unu — 400, unu — 300, unu — 200 markojn, 10 premioj po 100 kaj 20 — po 50 markoj. Tiamaniere ni donos en ĉiu aparta serio po 5000 markoj da premioj, kaj sekve en ĉiuj dek serioj ni disdonos **360 premiojn** en la sumo de **50,000 markoj.**

Krom tio, post disvendo de ĉiuj dek serioj kaj post disdono de la premioj al la varbantoj, ni donos ankoraŭ unu ĉefpremion — **la domon en Parkurbo, valorantan 18,000 Mk.** al tiu el niaj kunlaborantoj, kiu varbos por ni la plej grandan nombron da aĉetantoj de la lotleteroj **en ĉiuj dek serioj kune;** anstataŭ la domo, la gajninto de la premio povas ricevi **15000 Mk. per mono.**

Do, kiu volas preni sur sin la varbadon de la aĉetantoj kaj kune de la anoj de la Propaganda Ligo (ĉar ni povas vendi la biletojn de nia loterio nur al personoj, aliĝintaj al nia Ligo), tiu bonvolu tuj skribi pri tio al ni, petante la necesan kvanton da **libretoj kun kontrolkuponoj** (en ĉiu libreto estas 25 kuponoj), por ke li povu noti kaj numerigi en tiu libreto la nomojn kaj la adresojn de l'varbitoj, — kaj poste laŭ tiuj kuponoj ni kontrolos kaj kalkulos la nombron de ĉiuj venditaj biletoj, por difini, kian premion devas ricevi la varbanto.

Karaj Kunlaborantoj! **Pro la nomo de la sankta afero kaj pro la granda kultura ideo, ni kore petas ĉiujn niajn gesamideanojn aliĝi al la „Propaganda Ligo" kaj kiel eble plej larĝe disvastigi la sciigojn pri Parkurbo-Esperanto inter siaj amikoj kaj gekonatoj, proponante ankaŭ al ili aliĝi al la Ligo, des pli, ke la aliĝo estas tute senpaga kaj absolute senriska, ĉar la Propaganda Ligo estas laŭleĝe enskribita en la regnan societregistron (E. S.)**